



Esperanto
en Danio

19-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2012

ESPERANTO

125

1887-2012

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Therkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 50 38 41 77 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.05.2012

Enhavo

La defio de la jaro: projekto

125!.....3

Invito al Esperanto-Sumoo.....4

Esperanto rigardata de ekstere

.....5

Interesa retprojekto.....9

Androjda Esperanto-radio.....10

Kurslanĉo kaj festo sur la

Esperanto-Insulo.....11

Forpaso.....12

Kopenhago.....12

Paperaj gazeteltondaĵoj.....14

Næstved.....15

KEF 10 en 2012.....15

IFK en Herzberg.....16

Ekzamenoj samtage tutmonde

.....18

La efiko de literaturo.....19

Migri en Germanio.....20

GEO-kaŝludo.....21

Festivalo en Bulgario.....21

Letero el SriLanko.....22

La defio de la jaro: projekto 125!



Nian kovrilpaĝon ornamas ĉi-foje la bela simbolo de la projekto 125. Oni iniciatis tiun projekton por festi la 125-an jaron de la unua eldono de la lernolibro de Zamenhof, do la naskiĝtagon de Esperanto. Zamenhof devis atendi 2 permesojn de la ruslanda cenzuro antaŭ ol li povis finfine eldoni la lernolibron la 26a de julio 1887. La unua libro aperis en la lingvoj rusa, pola, franca kaj germana. Mi mencias kelkajn faktorojn kiuj

kontribuis la la sukceso de la lingvo:

En sia antaŭparolo al la “Unua Libro” Zamenhof menciis ke la “Lingvo Internacia” kiel ĉiu nacia lingvo estas komuna propraĵo kaj ke la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi. Pri la problemoj, kiuj devis esti solvitaj li mencias la jenajn:

1. Ke la lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante.
2. Ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la kompreniĝado kun homoj de diversaj nacioj, tute egale ĉu tiu ĉi lingvo estos akceptita de la mondo kaj trovos multe da adeptoj au ne – t.e. ke la lingvo jam de la komenco mem kaj dank’ al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komuniĝoj.
3. Trovi rimedojn por venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivantan, – ne nur ŝlosilo en la manoj kaj en okazoj de ekstrema bezono.


Hodiaŭ ni povas konstati ke pere de liaj sagacaj pensoj, la lingvo sukcesis ege bone pri la du punktoj kaj parte pri la tria kiu estas nia tuttempa defio ĉar ni ne atingis la finan venkon, sed feliĉe ni povas konstati ke ĝi evoluas en pli kaj pli da landoj.

Pli konkrete pri la projekto 125 oni fondis internacian informan grupon, kaj DEA jam sendis la unuan gazetaran komunikon. Rezulte almenaŭ unu gazeto skribis pri la evento: Jyllands-Posten aperigis artikolon la 15-an de januaro, sekvata de du leteroj de legantoj. Sekvos aliaj komunikoj dum la venontaj monatoj. Ni planas plurajn eventojn, kiujn oni povas legi pere de

la ligilo: http://www.uea.org/vikio/Danlando_125, sed ankaŭ la membroj povas kontribui kun personaj taskoj: la konata japano HORI Jasuo proponis ke oni lernu la himnon parkere. Li ankaŭ okazigas “Sumooon” pri legado de Esperanto-libroj ĉiun duan monaton. Al la partoprenantoj s-ro Horu sendas diplomon. Espereble ankaŭ niaj membroj volas partopreni, do mi deziras al niaj membroj fruktodonan agadon!

Invito al Esperanto-Sumoo

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. En marto, ekde la 11a ĝis la 25a (du semajnoj), okazos marta/printempa Sumoo. Okaze de tiu konkurso mi proponas al vi partoprenon en tiu Esperanto-Sumoo.



1. Celoj:

1. Altigi legkapablon de esperantistoj.
2. Kutimigi esperantistojn legi libron kun ĝojo

2. Luktomaniero:

1. Elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso.
2. Decidu kiom da paĝoj vi legos por unu tago laŭ via kapablo.
3. Laŭ la irado de vera Sumoo-konkurso, ni luktadas. Se vi legas promesitajn paĝojn ĝis la noktomezo de tiu tago, vi gajnos ○ (blankan rondon, venkon), se ne, ● (nigran rondon, malvenkon). Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj. Vi ne luktos kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem.

3. Aliĝo: Sendu jenajn informojn al mi:

1. Via nomo, sekso, lando, urbo, retadreso
2. Via luktista nomo
3. Titolo de la libro, kiun vi legos, kaj kiom da paĝoj vi legos

Ekzemplo:

Nomo: HORI Jasuo, viro, urbo Maebaŝi, Japanio,
hori-zonto@water.sannet.ne.jp

Luktista nomo: Horizonte

Libro: Ŝtona Urbo, 20 paĝoj

4. Raportu vian rezulton ĉiun duan tagon

Kiam komenciĝos la Sumoo, ĉiun duan tagon raportu al mi pri via venko aŭ malvenko. Mi notas ĝin kaj resendos al vi la raportaron kun alies rezultoj kaj komentoj.

5. Mia peto:

Varbu luktistojn en viaj kluboj. Mi volas kolekti minimume 100 luktistojn el la tuta mondo. En januaro partoprenis 73 luktistoj en la tuta mondo. Mi volas, ke tiu Sumoo estu organizita en multaj landoj. Se ni povos kolekti 500 luktistojn, ni povos evoluigi la movadon, kaj eĉ povos ŝanĝi la mondon.

*Iniciatinto de Esperanto-sumoo HORI Yasuo
hori-zonto@water.sannet.ne.jp*

Esperanto rigardata de ekstere



De Jens S. Larsen. – Ĉi tiu artikolo estas resumo de miaj lastatempaj kontribuoj en la retgazeto Libera Folio.

Arthur Koestler kaj Noam Chomsky

La fama aŭtoro Arthur Koestler (1905-1983) plurloke (ekzemple en “The Lotus and the Robot” de 1966, tradukita ankaŭ en la danan) malestime nomas “Esperanto-arkitekturo” tion kion la arkitektoj mem kutime nomas

“la internacia stilo”, kaj oni ankaŭ povas trovi lokojn kie li priskribas la esperantistojn kiel naivulojn. Sed fine de la 1960-aj jaroj, en eseoj kiuj ne troviĝas en dana traduko, li komencis priparoli Esperanton pli respektive.

Ekzemple en la eseo de 1969 “The urge to self-destruction” (La dezirego de memdetruo, represita en “The heel of Achilles”, 1974), li diras: *“Estas groteska paradokso ke ni havas komuniksatelitojn kapablajn vidigi kaj aŭdigi mesaĝon al la tuta planedo, sed forestas tutplaneda lingvo kapabla komprenigi ĝin. Eĉ pli strange estas ke krom kelkaj fidelaj Esperantistoj, nek Unesko nek iu alia internacia instanco serioze klopodis por antaŭenigi universalan komunan lingvon – kian havas la delfenoj.”*

Intertempe progresis la scienco, kaj jam estas klare ke delfenoj ne vere havas lingvon, ĉar ili ne kapablas generi frazojn. Sed oni notu ke ankaŭ la esperantistoj intertempe progresis. Koestler absolute ne estis stultulo, sed tiu “unuigismo” kiun li ĉi tie aprobas kaj ne tute malprave atribuas al la tiamaj esperantistoj, al ni nuntempe impresas pli kaj pli naiva. Kreskis la konscio ke necesas diverseco apud la sopirata unueco, kaj se Esperanto estas bona ideo, tio estas ĉar ĝi povas kontentigi ambaŭ flankojn.

Sed Koestler okupiĝis ankaŭ pri aspektoj de lingvo kiujn la esperantistoj dum longa tempo tute neglektis. En alia eseo de 1969, “Can psychiatrists be trusted?” (Ĉu psikiatroj estas fideblaj?) li skribas jene:

Psikolingvistiko, tiusence kiel Chomsky kaj lia skolo uzas tiun terminon, estas nova branĉo de psikologio kiu je la unua fojo provas ekataki la problemon kiamaniere la infano aĝiĝinte kvar jarojn kapablis akiri la gigante kompleksajn regulojn kaj strategiojn de la lingvo, kiamaniere ĝi povas produkti frazojn kiujn ĝi neniam antaŭe aŭdis, kaj manipuli sintaksan kaj semantikan maŝinaron kies funkcimaniere estas komplete nekonata al la infano – same kiel al la plenkreskulo. Dum pli ol jarcento, la akademia psikologio ne nur malsukcesis ekstrakti tiun problemon, sed eĉ ekvidi ke ĝi ekzistas. Sed la neŭrokirurgo kaj psikiatro estis puŝpremita en ĝin; kaj li devis provi establi sencon el la diversaj bizaraj tipoj de afazioj kaj rilataj malsanoj, ricevante nenian helpon de la psikologo. Tute male, oni povas diri kun nur malmulte da troigo ke estis la neŭrokirurgio kiu instruis al la psikologo tiun malmultan realan scion kiun tiu havas pri la mekanismoj de lingvo kaj memoro.

Ankaŭ ĉi tie multe progresis la scienco, aŭ pli precize: la lingvistiko kiel psikologia kaj racia scienco. Tiuj progresoj ne multe diskoniĝis, sed se ni deziras ke homoj prenu la problemon de internacia lingvo serioze, ni devas havi la plej bonajn lingvistikajn argumentojn por tio. Dum tre longa tempo la Esperantomovado neglektis la psikologian flankon de la homa lingvo. Nur en 2010 UEA eldonis la esejon *Lingvo kaj menso* de Noam Chomsky, kies unua eldono aperis jam en 1968 – kaj kelkajn jarojn poste aperis la dana versio “Sprog og bevidsthed”!

Philippe van Parijs, Fleurbaey kaj Jansson

Ĉar la esperantistoj mem ne prenis lingvistikon sufiĉe serioze, multaj gravaj sciencistoj ne prenas Esperanton tiel serioze kiel ĝi meritus. Unu el ili estas Philippe van Parijs, belga filozofo kaj ekonomikisto sufiĉe grava por havi pri si Vikipedian artikolon en naŭ lingvoj. Pasintjare aperis honore al li la artikolaro *Arguing about justice* (Argumentadi pri justeco), en kiu liaj kolegoj diskutas kiel atingi la maksimumon de justeco en la diversaj kampoj pri kiuj Parijs mem laboris. Estante belgo, van Parijs nature okupiĝis ankaŭ pri lingva justeco, kaj la artikolo de Marc Fleurbaey diskutas ĝuste la meritojn de la angla kaj de Esperanto kiel internacia lingvo. La artikolo favoras la anglan, same kiel la nova libro *Linguistic justice* de Parijs mem.

Malgraŭ sia konkludo pri internacia lingvo, tiu libro de Parijs estas enorme interesa laŭ esperantista vidpunkto. Ĝi vere majstre priskribas kaj klarigas sian temon, tamen ĝia argumentado por ekskluzivi Esperanton el konsidero estas treege malfortaj. Tio estis tiel forta invito al kontraŭdiro, ke mi sendis longan retleteron al la aŭtoro. Parijs respondis du semajnon poste, dankante por la letero kaj koncedante ke mi kredeble pravus en pli ol unu el miaj argumentoj! Li ankaŭ petis min klarigi du detalojn en mia letero, do kredeble estis pli ol ĝentilaĵo.

Parijs ne estas lingvisto, sed oni ne sentas tion kiel mankon en la libro, ĉar plejparte li simple ne argumentas lingvistike. Unu escepto tamen estas, nome anekso al ĉapitro 1, kie li klarigas kial li ne volas konsideri tri solvojn de la lingvoproblemo: komputila tradukado, Esperanto aŭ la oficialigo de pli ol unu nacia lingvo kiel internaciaj. La lastan oni facile rifuzas per iom da aritmetiko, kaj la unua ne estas teknike realigebla (je kontentiga nivelo, almenaŭ) – sed por rifuzi Esperanton oni bezonas lingvistikan argumenton. Kvankam la sekcio pri Esperanto estas la plej longa

el la tri, Parijs donas nur unu referencon al la lingvistika literaturo, kaj ĝi estas pli ol 50 jarojn aĝa! Se li fokus pli profunde, li malkovrus la paradokson ke lingvistikaj argumentoj tute ne gravas por la debato pri lingva justeco. Sed se tio igas lin mokinda – tiam la facila lernebleco de Esperanto ankaŭ estas mokinda, ĉar tio estas lingvistika argumento...

Ĉiuokaze, vera malvenko estas nur se fakulo trovas manieron tute ne menciigi Esperanton en la kunteksto de internaciaj lingvorilatoj. Tion sukcesis fari la sveda lingvisto Tore Jansson en sia nova libro “The history of languages” (La historio de la lingvoj), kiu temas pri la ekesto kaj disvastiĝo de la lingvoj. Ĝi estas sufiĉe interesa, kaj ankaŭ multe pli facile legebla ol la libro de Parijs, sed kvankam la lasta ĉapitro estas prognozoj pri la lingva stato de la tero post 200, 2000 kaj 2 milionoj da jaroj, estas kvazaŭ Jansson tute ne scias ke Esperanto ekzistas.

John-Paul Davidson kaj Stephen Fry

La intereso pri lingvo tamen kreskas ne nur inter universitatuloj, sed ankaŭ en la ĝenerala publiko. Eble vi scias ke la fama brita televidstacio BBC favore menciis Esperanton en pluraj dissendoj lastatempe. Ŝajnas ke la kaŭzo estas ke du kunlaborantoj de BBC ekvidis Esperanton kiel interesan parton de la tutplaneda lingva diverseco. John-Paul Davidson kaj Stephen Fry jam antaŭe kunlaboris pri dokumenta serio nomita “Stephen Fry en Usono”, kaj pasintaŭtune dissendiĝis ilia 5-parta *Planet Word* en BBC2. Rete spektblas nur eltondaĵoj, sed la televidan serion akompanas granda kaj bela libro kun la sama titolo.

En la televidaĵo, Esperanto estas menciita unuafoje fine de la unua parto. Tie Fry demandas al araba interpretistino ĉe UN ĉu ne estus multe pli bone se ĉiuj parolus nur unu saman lingvon, ekzemple Esperanton – kaj la interpretistino kompreneble tuj vigle rifuzas, insistante ke ne temas pri tio ke ŝi perdus sian laboron. Tio tamen ne esprimu malŝaton al Esperanto flanke de Davidson kaj Fry, ĉar en la libro la nomo Esperanto ne aperas tie.

En la libro la nomo Esperanto aperas unuafoje ligo kun la hebrea kaj la jida. Tie estas notite ke Zamenhof elektis tute alian solvon de la juda lingvoproblemo ol tiuj kiuj diskutis kiun lingvon oficialigi en Israelo. Sekvas ses paĝoj dediĉitaj tute al Esperanto. Estas kelkaj fraz-ekzemploj, ĉiuj korektaj kaj kun la ĉapeloj ĝuste metitaj – kiel ofte oni vidas tion? La lingvo mem estas karakterizata kiel iom strang-aspekta, sed la idealismo

kaj literaturo de la esperantistoj estas preparolataj kun profunda respekto.

La filmo kaj la libro estas verkitaj laŭ tre Brita perspektivo, sed se oni povas iom flankenŝovi sian ĝeniĝon pro tio, ili enhavas treege multe da utilaj informoj pri la homa lingvo, la lingvoj de la mondo kaj la aktuala stato de lingvistiko. Tial ili estas spektinda kaj leginda precipe de Esperantistoj. Eble oni devus klopodi por fari subtekstojn en Esperanto por la filmo, ĉar la peno traduki la libron en aliajn lingvojn ne indas sen drastaj ŝanĝoj por adapti la perspektivon.

Interesa retprojekto

En multaj sferoj, esperantistoj profitas de la samtempa kunlaborado, kio multe faciligas la interreto – Vikipedio eksistas en Esperanto, kaj esperantistoj partoprenis en projektoj de komputila programaro por fari esperantlingvajn versiojn de multaj programoj. La projekto Gutenberg publikigis klasikajn librojn en Esperanto.

Aperis interesa projekto: Participatory Culture Foundation - *Universal Subtitles*, videbla ĉe universalsubtitles.org. Tie oni povas fari subtekstojn por filmoj de Youtube, Vimeo kaj aliaj. Esperanto estas sur la listo de lingvoj.

La uzado de tiu ilo estas tre facila. La tradukanto trarigardas la filmeton en mallongaj segmentoj, survoje skribas la tradukon kaj tempostampas la segmentojn. Jen, la sistemo enmetas la subtekstojn rektatempe.

Por la spektantoj la proceso estas nevidebla – oni ricevas ligilon en universalsubtitles.org; la retpaĝo prenas la videon de Youtube kaj supermetas la subtitolon, kiel en televido.

Tio estas grava ideo por minoritataj lingvoj, sed kulturriĉaj nacioj, kiel Danio. Tiumetode, la filmoj povas esti kompreneblaj por ĉiuj - senpage.

Morten Juhl-Johansen Zölde Fejer

Androjda Esperanto-radio

Ĉiam pli da homoj havas kaj uzas inteligentajn telefonojn kaj tabulkomputilojn, funkciantaj per la operacia sistemo androjdo. Ĝus aperis senpaga aplikaĵo “Esperanto-radio Muzaiko” por androjdaĵaj aparatoj, kiu ebligas aŭskultadon de 12 Esperantaj radio-kanaloj!

La aplikaĵo estas senpage elŝutebla el la retbutiko de android.com, por trovi ĝin faru serĉadon je la vorto: “Muzaiko”. Post la instalo defaŭlte ĝi tuj sonigas la 24-horan radiostacion “Muzaiko”, kaj ofertas elekton el al 12-kanala sortimento de Esperanto-radiopodkastoĵoj. Per la aplikaĵo oni povas ne nur elekti inter la divers-dataĵaj podkastoĵoj de tiuj radio-kanaloj, sed ĝi aperigas ankaŭ la hejmpaĝojn de ili, kaj donas eblon por tuja kontaktado de redakcioj.

La androjda radioprogramo estas tre utila, ja multe-multe simpligas la aŭskultadon de Esperantaj radioelsendoj. La inteligentaj telefonoj estas ĉiam ĉemane, sufiĉas *unu* butonpremo por la aŭskultado, kaj la elsendoj kapteblas ankaŭ (ofte senpage) per vifia konekto (en la moderna mondo preskaŭ ĉie ili jam ekzistas)...

La aplikaĵon projektis Jacob Nordfalk, profesia programisto, kiu faris similan androjdan projekton ankaŭ por la dana ŝtata radioinstanco. La aplikaĵo “Esperanto-radio Muzaiko” estas senpage elŝutebla kaj instalebla.

En la retbutiko de android.com oni povas trovi nur kelkajn Esperanto-rilatajn aplikaĵojn... Tiu de “Esperanto-radio” de Jacob Nordfalk estas profesieca, kaj ĝi estas senpaga. Se oni estas kontenta pri ĝi, oni povas donaci 1 aŭ 2 eŭrojn per elŝuto de samnoma paga programo – kiu ne instalas ion ajn en la telefonon, nur peras la monon al la aŭtoro por subteni evoluigadon de pliaj Esperantaj aplikaĵoj! (Faru serĉadon inter la aplikaĵoj je la vorto: “donaco”!)

Jakob kore invitas spertajn androjdistojn al kunlaboro por daŭre aktualigi kaj plibonigi la programon. Detaloj pri tio legeblas en la rubriko “Pri” en la aplikaĵo mem.

Szilvási László [ret-info]

Kurslanĉo kaj festo sur la Esperanto-Insulo



*Jen nia membro Peter Wraae (meze) sidas
apud la kursgvidanto Dennis Keefe (maldekstre)*

Realiĝis la projekto “Esperanto-Insulo”.

La 11an de januaro okazis la oficiala malfermo de la Kursaro, organizita kadre de la projekto Esperanto-Insulo. Al la tutmonata programo aliĝis 110 personoj el 23 landoj. Iom pli ol la duonon konsistigas 60 ĉinoj, plejparte studentoj, kiuj kun kelkaj mongolaj samkursanoj estas stipendiataj por tage 8 horojn lerni la internacian lingvon dum 4 semajnoj.

La partoprenon de tiuj ĉi junuloj ebligis la volontula laboro kaj subteno de la kvar instruistoj kaj grandnombra partoprenantaro el Eŭropo kaj kelkaj alikontinentaj kursanoj.

La ĉefa kursaro de la komencantoj estas gvidata de Dennis Keefe, laŭ lia fama BEK-metodo kaj observata kaj helpata de trideko da partoprenantoj de la pedagogia seminario, kiun Katalin Kovats gvidas. Unu el la ĉefaj taskoj de la kursaro pri metodiko estas ĝuste lerni multon pri tiu ĉi metodo kaj aktive helpi kaj dumkurse kaj eksterklase al la novlernintoj praktiki la lingvon kaj havi komunikadspertojn.

Krom la komencantoj la aliaj ĉeestantoj havas la eblon frekventi pliajn du kursojn la universitatan kurson de Ronald Glossop (Usono): Alfronti militon, kaj tiun de Frederico Gobbo (Italio) pri la Filozofio kaj historio de informatiko.

Dum la malferma ceremonio, matene la 11an de januaro oni laŭtlegis la gratulmesaĝojn, inter ili tiujn de Stefan MacGill, Renato Corsetti kaj de la estroj de la landaj sekcioj de ILEI el Germanio, Svislando, Koreio.

Fine de tiu malfermo surprize por la lanĉinto de la ideo Espertanto-Inslulo estis anoncita grava novaĵo. Katalin Kováts, kiel kuriero de "La Ondo de Esperanto", transdonis la diplomon al la novelektito Dennis Keefe. La aranĝo estis pluroble interesa kaj simbola, ĉar Dennis Keefe ricevis sian distingon rekte el la manoj de sia antaŭulino, de la esperantisto de la jaro 2010 kaj kadre de ĝuste tiu aranĝo por kiu Dennis estis premiita.

[<http://www.edukado.net>]

Forpaso

Fine de januaro mortis Jacob Jensen en Vejle post malsano dum 2 semajnoj. Jacob kaj lia edzino Minka ekstudis Esperanton en 1986, kaj ili fariĝis tre aktivaj kaj ŝatataj membroj de la loka klubo. Ili multe vojaĝis, sekvis esperantokursojn en Francio kaj Svedio kaj partoprenis kongresojn por esti kune kun aliaj esperantistoj. Ili ankaŭ estis tre gastemaj, kio utilis kaj al la lokaj klubmembroj kaj al eksterlandanoj.

Jacob kolektis esperantolibrojn, ĝis li havis bibliotekon kun 1000 libroj en sia hejmo. Nun DEA posedas la librojn. En 1997 Jacob fariĝis prezidanto de la klubo de Vejle kaj Fredericia. Li estis aktiva kaj bona gvidanto ĝis 2002. Tiam la vivo fariĝis pli malfacila por la paro, ĉar la vidkapablo de Minka ege malkreskis. Finfine ili devis translokiĝi al speciala fleghejmo, kie Minka mortis en 2010. Jacob restis tie ĝis sia morto pro pulminflamo.

Ni perdis bonan membron, kiu komprenis, kiel efike Esperanto povas utili al bonaj homaj interrilatoj.

Tove Bak

Kopenhago

La kunvenoj de KEK komenciĝas je la 19-a kaj finiĝas je la 21-a. La adreso estas: Tomsgårdsvej 35, 2400 Kobenhavn NV. Cetere la klubprogramo legeblas ĉe la Facebook-grupo 'Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo'. La klubkontakto estas la prezidanto:

Betty Chatterjee +45 38 89 10 13 chatterjeebetty@hotmail.com

Okazos

Februaro:

La 6-an: Dum la Universala Kongreso en Kopenhago Lene kaj Jan Nieman prelegis pri Gronlando. Ni nun bonŝancos ĝui/reĝui la prelegon.

La 13-a de februaro. DEA gvidos la kunvenon. Pri la jubilea jaro 125 – signifo kaj planoj.

La 20-a de februaro. Jarkunveno de KEK. La tagordo, la raporto de la prezidanto kaj la kalkulaĵoj estis senditaj meze de januaro.

La 22-a de februaro(merkredo): Ekskurso al la Ŝtata Muzeo de Arto. <http://www.smk.dk/udforsk-kunsten/udstillinger/one-language-traveller/>

La 27-a de februaro. Junulara Vespero. Ĉiutagaj rakontoj. Kiamaniere ili strukturis nian vivon.

La 5-a de marto. Prelego ‘Cifereca kaj reta indenteco de individuoj’. Amir.

La 12-a de marto. Studrondo pri Marvirinstrato. 'Spektaklo' paĝoj 108 – 116. Ankaŭ legeblas jene <http://timwestover.com/marvirinstrato/wp-content/uploads/2009/05/marvirinstrato.pdf> Bent Jensenius gvidos la studrondon.

La 19-a de marto. Jens S. Larsen parolos pri gramatikaĵoj.

La 23-a de marto (vendredo). Taga ekskurso al Kopenhaga Urbo-muzeo. http://www.copenhagen.dk/dk/besog_museet/praktisk_information. Ni ekskursos ne merkrede, ĉar oni senpage rajtas viziti nur vendrede.

La 26-a de marto. Junulara vespero. Temo anoncota.

(La 2-a kaj la 9-a de aprilo estas en la Pasko, sekve ne okazos kunvenoj.)

La 9-an de aprilo Pasko

La 16-an de aprilo. Tibor Sekelj vespero.

La 23-an de aprilo 'Numerluda Vespero'. Finn kaj Kamma gvidos.


La 25-an de aprilo. Recenza vespero. Kion vi legas? Ĉu laŭ vi la libro legita estis leginda, legenda aŭ forĵetinda?

La 30-an de aprilo Junulara vespero. Temo anoncota.

La 7-an de majo. Esperanto-Doma vespero.

Okazis

Du trionoj el niaj klubanoj estas emerituloj. Pro tio kelkaj el ni jam decidis, ke unu fojon monate ni dumtage ekskursu (kompreneble nur parolante Esperante) ie en la urbo. Ŝajnas al ni, ke tia agado iomete helpos videbligi nian lingvon.



En novembro okazis nia unua ekskurso. Post bongusta lunĉo en kafejo ni (sesope) piediris al Ĝardeno de Tivoli. Post promenado en la ĝardeno ni paŭze kafumadis en alia kafejo, antaŭ ol ni daŭre ĝuis la kristnaskan etoson; ho jes, komenciĝas Kristnasko.

Ĉu ni varbis novan samideanon? Ne, kaj neniuj ŝajnis rimarki nian strangan lingvon. Ni ne disdonis propogandilojn; kvankam unu el ni hazarde 'forĝesis' flugfolion en la kafejo.

Tamen babilante Esperanton ni ĝuis agrablan kunestadon kaj ni ekzercis la lingvon. Venontfoje ni vizitos ian muzeon.

Betty Chatterjee

Paperaj gazeteltondaĵoj

Dec 2011: Samvirke: Krucvortenigmo

Dec 2011: Jernbanefritid: Et repræsentrantskabsmøde

Dec 2011: Hjemmets Julekryds: Krucvortenigmo

Dec 2011: Radioprogramo de Radio Vatikano

12.01.2012: Berlingske Tidende: Bildstrio Hagbard

15.01.2012: Jyllandsposten: Verdens yngste sprog fylder 125 år

20.01.2012: Jyllandsposten: Esperanto – et internationalt sprog og let at lære

22.01.2012: Jyllandsposten: Esperanto er naturligt sprog

Daŭre sendu ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk.

Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenciĝohoroj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj.

Okazos

Ma 21.02 je h 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN.

Ma 28.02 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro 49 de F+F + konversacio. (Rim.: Ni ne uzos ĉap 48).

Ma 06.03 je h 19.30: Danlingva prelego: Lene kaj Jan Niemann pri novaj travivaĵoj en Laoso.

Ma 27.03 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro 50 de F+F + konversacio.

Ma 10.04 je h 19.30: Sezonfino laŭ kutime agrabla kaj ujutna etoso.

Okazis

Posttagmeze la 13-an de decembro kolektiĝis 13 personoj por kune ujutni kaj prepari la animojn por la jultempo. Kvankam ni dum pluraj jaroj batalis por cementigi la esprimon ujutna (rusdevena vorto, kiu signifas hyggelig, kaj siatempe proponita de d-ro Paul Neergaard), ĝi ankoraŭ ne akiris sufiĉas apogon. Kial tiu obstrukco? Nu, ni paciencas. Romo ne estis konstruita dum unu tago.

La studgrupo diligente laboris la 10-an de januaro en sobra kaj agema etoso, kaj la konversacia tasko de Liss-Lotte aktivigis la cerbajn eblecojn.

KEF 10 en 2012

Por la 10-a fojo junuloj en nordio aranĝas “Kultura Esperanto Festivalo”, ĉi-foje inter la 10-a kaj la 16-a de julio 2012.

Ĝi estas festivalo kie ni prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon. Baze la unuaj tagoj de la festivalo estas pli metiejaj kaj la lastaj tagoj estas pli distraj. La festivalo estas festivaleja en sia formo, tiusence ke oni loĝas primitive kaj tiel maniere la kostoj ne estas tiom altaj. Vi povas jam nun aliĝi kaj vidi la kotizojn ĉe <http://kef10.saluton.dk/>.

Amaso da bonaj konataj Esperanto-artistoj venos, ni menciuj en hazarda ordo: Hotel Desperado, La Perdita Generacio, Inicialoj DC, Gijom, Johannes, Jonas kaj pli Junas, Jerzy Fornal kaj Danĝera. Pli da artistoj venos. Ni de tempo al tempo aktualigos la hejmpaĝon kun la novaj nomoj.

Flo de Vinilkosmo agadas, multaj amuzaj metiejoj okazos. Vi povas spekti filmojn en Esperanto, legi kaj fari komiksojn, lerni poemi en Esperanto, partopreni danc-atelieron kaj entute ĝui la plej grandan aranĝon kun Esperanto kulturo.

Kim Henriksen

IFK en Herzberg

Internacia kongreso en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo – kun speciala evento kadre de la Esperanto-125-projekto.

Esperanta vivo estas ja plena de ofertoj pri kongresoj kaj aliaj interesaj eventoj. Ĉi-jare la UK okazos en Hanojo en fora Azio, kaj eble ne multaj danoj planas iri tien – sed eble al Irlando por la EEU-kongreso.

Pri alia interesa afero ni volas informi vin: La ĉi-jara Internacia Fervojista Kongreso okazos en Herzberg am Harz 19.-25. majo. Ĝi ofertas – krom la fakajn kunvenojn kaj prelegojn kaj la organizajn aferojn – abundan kaj buntan kulturan kaj turisman programon, kaj la etoso estas ĉiam gaja kaj amika. Vi povas demandi al Sven kaj Ana, kiuj jam provis partopreni fervojistan kongreson – ĝi ne estas 'fermita afero'! Kutime partoprenas ĉ. 200 homoj el 15-17 landoj.

En 2012 ĝi estas eĉ pli alloga al danoj, ĉar kvazaŭ postkongreson la organizantoj proponas la Komunan Dan-German-Polan Kongreson en Berlin-Lichtenberg 25.-28. majo, kaj al tiu evento certe jam multaj el vi pripensas iri.

La kongreson de la fervojista internacia federacio IFEF organizas praktike ICH, Internacia Centro Herzberg, kaj ni havos eblecon konatiĝi kun la urbo, kiu oficiale sin nomas 'La Esperanto-Urbo' – kun multaj signoj pri tio en la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo.

La loka kongresa komitato preparis invitilon kaj aliĝilon, kiuj ambaŭ haveblas ĉe la DEFA-prezidanto Jan Niemann, tel. 4926 1319, rete niemann@kabelmail.dk. Jen eroj de la programo:

- Interkona Vespero
- Solena malfermo, uniformparado
- Urbrigardo en la Esperanto-Urbo
- Prelego pri Herzberg kaj la Harz-montaro
- Nacia vespero
- Internacia balo
- Ekskurso al Göttingen
- Ekskurso al Scharzfeld
- Ekskurso al Ilfeld, Wernigerode, Nacia Parko Harz
- Ekskurso al Goslar
- Kultura vespero
- Internacia Balo

Krome povus interesi danojn, ke la ĉefa fakprelego temos pri la Baltmara Tunelo, do la firma interligo inter Lolland kaj Fehmarn, kiu estos preta en 2020. La prelegon verkas DEFA-membroj.

Alia *tre* interesa afero estas, ke dum la semajnfino (19/5-20/5) okazos instru-sesio kadre de la Esperanto-125-projekto, kunlabore kun ILEI. La prezidanto de ILEI, Stefan MacGill, skribas:

ILEI kaj IFEF trovas komunan terenon por kunlabori

ILEI starigas kunlaboron kun IFEF (Internacia Fervojistia Esperanto-Federacio), kadre de ties 64-a Kongreso. Estas konsentite, ke ILEI ofertas nov-specan programeron – naŭ-sesian seminarion pri la arto kaj ebloj instrui Esperanton en fervojistaj rondoj. Ĝi celas instruistojn kaj kursgvidantojn (aŭ –ontojn), ne nepre fervojistajn. Estos tempo por seminarioj interŝanĝi instru-spertojn, diskuti jubileajn planojn kaj varbadojn, kune kun tasketo prepari en paroj kvin-minutajn modellecionojn.

La tri-taga kurso antaŭvideble komenciĝos en sabato (2 sesioj), kun tri pliaj horoj dimanĉe kaj kvar lunde. Ĝin gvidos la prezidanto de ILEI, Stefan MacGill. La kosto por la seminario kaj ĝiaj presitaj materialoj estos 10 eŭroj por aliĝintoj al la IFEF-kongreso kaj 20 eŭroj por nealiĝintoj, pageblaj surloke. Atestilojn pri partopreno ricevos ĉiu kiu ĉeestas ĉiujn sesiojn. La seminaria programo kaj superrigardo de la etapoj de la fervoja kurso estos videblaj en la retejoj de ILEI kaj la Kongreso.

DEFA

Ekzamenoj samtage tutmonde

Laŭ la norma ekzamensistemo KER (Komuna Eŭropa Referenckadro) eblas kompari kursojn, lingvajn sciojn kaj ekzamenojn en 27 lingvoj, kaj ekde 2008 unu el ili estas Esperanto.

Sabaton la 9an de junio UEA aranĝos *skribajn ekzamenojn pri Esperanto en multaj lokoj tra la mondo*. La KER-ekzameno konsistas el du partoj: skriba kaj buŝa. La 9an de junio okazos nur la skriba, ĉar por samtempe aranĝi ankaŭ la buŝan necesus multaj altkvalifikitaj ekzamenantoj. Buŝe oni povos ekzameniĝi iam poste, ekzemple dum iu kongreso.

Oni povas elekti inter la niveloj B1, B2 kaj C1. (A1 – la plej facila – kaj A2 oni lasas al la landaj asocioj; C2 ankoraŭ ne estas preparita). Pli ol 500 esperantistoj jam ekzameniĝis laŭ la KER-sistemo je iu el la niveloj.

La partoprena kotizo estos la duono de tiu por la tuta ekzameno, ĉar temas nur pri la skriba parto. Ĝi iom varias laŭ la nivelo, sed estos ĉirkaŭ 300–400 svedaj kronoj. (Ĉu tio estas (mal)multo? – Legu pli ĉe edukado.net/komunumo/forumo?f=139.) La sukcesintoj ricevos belan diplomon, en Esperanto kaj tri aliaj lingvoj, de la hungara altlernejo kiu respondecas pri la taksado..

Bonvenon al Lesjöfors

En 2012 ni celebros la 125-jaran jubileon de la apero de la Unua Libro la 26an de julio 1887, kaj tial unu el la multaj ekzamenejoj ĉi-foje estos la Esperanto-domo en Lesjöfors (meze inter Stokholmo kaj Oslo).

La Esperanto-domo ofertas tranoktadon por migrulhejma prezo, kaj por manĝoj vi pagu nur la rektajn kostojn.

Por pliaj informoj aŭ aliĝo vidu interrete edukado.net/ekzamenoj aŭ sendu retleteron al sef-ker2012@esperanto.se. Eventuale skribu al Esperanto-Gården – ekzameno, SE-680 96 Lesjöfors, aŭ telefonu al Bengt Nordlöf, 0(046) 70 7782430.

Bengt Nordlöf

La efiko de literaturo

La brazila esperantisto Benedicto Silva ĉeestis la UK pasintjare en Kopenhago. Jen kelkaj elĉerpaĵoj el lia raporto en “Brazila Esperantisto”:

Feliĉe, mi eklernis Esperanton en 1945, en la aĝo de 18 jaroj, precize la 14-an de julio de tiu jaro. Por mi, la ekposedo de la lingvo internacia signifis la malfermon de larĝa vojo al mia ne nur kultura, sed ankaŭ sentimentala kosmpolitiĝo. Tion mi eksentis, kiam mi ekrilatis kun homoj el ĉiuj kulturoj de la vasta mondo, ĉu per korespondado, ĉu per legado de la internacia literaturo.

Tiam, Esperanto ebligis al mi migradi tra la mondo kiel nuntempa vaganta kavaliro. La blankaj librofolioj estis por mi kvazaŭ la ĝusta vojo al magia mondo... Per tiu vojo mi sukcesis atingi ĉefe la literaturojn de la skandinavaj landoj... Kaj per tiuj literaturoj mi povis senti la vivon, la ĝojojn kaj malĝojojn, la aventurojn de la skandinavo.

Tiuj pensoj kaj sentoj ofte ekregis al mi la kapon kaj la koron, dum la tuta semajno, kiun mi pasigis kun mia edzino Maria Stella kaj la juna kaj talenta brazila esperantisto Mauricio Signorini Prado de Almeida, partoprenante la ĉi-jaran UK en Kopenhago.

[Sekvas rememoroj el Kalevala, la mirindaj vojaĝoj de Nils Holgersson, la sagao de Gösta Berling, la figuroj de Astrid Lindgren, Peer Gynt kaj Sep Fratoj de Aleksis Kivi]. La apogeo de mia reveko tamen okazis ĉe nia vizito al la ĉarma urbo Odense, riĉa je omaĝoj, rememoroj, am- kaj danksentoj al sia eminenta filo H.C. Andersen.

...

Miaopinie, la plej alta elmontro de eternaj amo kaj danko al H.C. Andersen estas la muzeo kaj apudaj teatro ĉirkaŭita de lageto, kie oni ofte prezentas ĉefe al infanaj spektantoj fabelojn de Andersen.

Jen kion la riĉa, internacia Esperanto-beletro povas inspiri al siaj multnombraj legantoj...

Jen kion mi povis sperti kaj ĝui dum mia mallonga restado en Danio, kiel ano de la ĉi-jara UK kaj, plie, kiel amanto de la skandinava kulturo.

Sendube, multaj aliaj kongresanoj spertis la saman senton...

Migri en Germanio

La 2-a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) okazos inter la 30-a de septembro la 5-a de oktobro 2012 (di-ve) sur la migrovojo “Rheinsteig” kaj tra “Binger Wald”. Oni tranoktos en CVJM-Gästehaus Elsenburg, Kaub am Rhein, (rete elsenburggmx.de). Prefere estas aliĝi per elektronika aliĝilo (vidu sube).

Programo

Dimanĉo, 2012-09-30: Alveno, vespermanĝo je la 18a, interkonatiĝo kaj prezento de la definitiva programo.

Lundo, 2012-10-01: Migrado de la tranoktejo al la apuda Rheinsteig kaj al la urbeto Lorch. De tie transporto reen al Kaub.

Mardo, 2012-10-02: Transporto al Lorch, migrado sur Rheinsteig. Survoje ebla vizito de gastejo (je propraj kostoj). Vizito de la iama “Freistaat Flaschenhals” (libera ŝtato Botelkolo), poste de la urba centro de la vin-urbeto Assmannshausen. Retransporto al Kaub.

Merkredo, 2012-10-03 (libera tago en Germanujo): Transporto al Assmannshausen. Krute supren al la alta bordo de Rejno (eblas iri proprakoste per telfero). Pluraj vidindaĵoj: ĉaskastelo de Niederwald, artefarita kaverno, pluraj elstaraj panoramejoj. Fine plumigrado al la Monumento de Niederwald. De tie malsupreniro al la fama vin-urbo Rüdesheim kun la fama turista bruejo Drosselgasse. Kiu havas tempon kaj emon, povas krome viziti la abatejon Sankta Hildegard. Se la tempo ĝis la vespermanĝo sufiĉos, oni povus reiri al Assmannshausen sur tre bela alternativa migrovojo.

Ĵaŭdo, 2012-10-04: Transporto al Kaub. Per pramo al Bingen (trans Rejno). De Bingen etendiĝas grandega arbaro “Binger Wald” kun pluraj vidindaĵoj: pendanta ponto trans fendego (nur je la amuzo de la turistoj), Schweizer Haus (gastejo en Svisa stilo), burgo Rheinstein (kun vizito), malsupreniro al la vilaĝo Trechtingshausen. De tie per ŝipo al Kaub.

Vendredo, 2012-10-05: Adiaŭo post la matenmanĝo.

Pliajn informojn kaj aliĝilon vi trovas ĉi tie:

www.esperanto.de/gea/ema2012.html

Wolfgang Bohr

GEO-kaŝludo

Saluton!

Mi volas informi vin pri la renkontiĝeto GEO. Ĝi okazos en Hungario por ekskursemaj kaj ludemaj esperantistoj. Ni aparte bonvenigas familiojn kun infanoj. La renkontiĝeto okazos inter la 11a kaj 15a de Julio, 2012.

Bonvolu informi viajn membrojn, kiuj eble interesiĝas.

Jen la hejmpaĝo de renkontiĝeto: geoesperanto.xoo.hu.

Dankon por la helpo!

familio Dévai

Festivalo en Bulgario

Okazos la 2-a Internacia Festivalo de Esperanto-Kanto, Recitado, Oratora Konkurso inter 31.03-02.04.2012 en Karlovo-Sopot, Bulgario.

Altaj protektantoj estos d-ro Emil Kabaivanov, Urbestro de Karlovo kaj Veselin Liĉev-Urbestro de Sopot. Organizas Bulgara Esperanto-Asocio, AIS-Bulgario, la Internacia Universitato Karlovo kaj la regionaj komitatoj de kulturo en Karlovo kaj Sopot.

Premioj por partopreno en la konkursa programo estos distribuotaj surbaze de la aĝo:

- I -a grupo: infanoj ĝis 12 jaraĝaj
- II- a grupo: gelernatoj ĝis 18 jaraĝaj
- III-a grupo: gestudentoj kaj gejunuloj ĝis 35 jaraĝaj
- IV-a grupo: aĝuloj pli ol 36 jaraĝaj

En ĉiu grupo aparte estos distribuo de la premioj por individua kaj grupa partopreno.

Tranoktado: en komuna loĝejo po 7 eŭroj por unu tranokto
en hoteloj 25-50 eŭroj por unu tranokto

Aliĝkotizo: 5 eŭroj por la partopreni la festivalan programon; por gelernantoj kaj gestudentoj la aliĝkotizo estas 2 eŭroj; 10 eŭroj por gastoj.

Interkona vespero kun vespermanĝo en restoracio: 8 eŭroj.

Festivala balo kun komuna vespermanĝo: 12 eŭroj.

Postfestivala feriado 'Karlova Printempo' (3-10.04.2012)

Ripozado kaj ekskursoj al diversaj urboj proksimaj de Karlovo (Plovdiv, Kalofer, Kazanlak, Baĉkova monakejo, Trojan k.a.). Sen aparta aliĝkotizo. Tranoktado en komuna loĝejo kaj hoteloj

Rimarko: partoprenontoj de la Festivalo kaj la Feriado kiuj tranoktos en la komuna loĝejo uzos rabaton pagonte 50 eŭrojn por la tuta tranoktado (10 tranoktoj).

LIMDATO POR RICEVO DE ALIĜILOJ: 26.03.2011. La aliĝkotizoj, kotizoj por la tranoktoj, vesperanĝoj estas pageblaj al bankokonto aŭ surloke, sed la aliĝiloj devus esti siatempe senditaj por rezervi la tranoktojn.

Adreso por aliĝo kaj informoj:

P.k.44 esperinform
4300 Karlovo
Bulgario

Retadreso: leonov@rozabg.com (prefere skribu rete).

Telefonoj: +359 885056469 (tage kaj nokte
+359 335 9 3933 (nur vespere)

SENDU LA ALIĜILOJN PREFERE TUJ AŬ ĜIS 26.03.2011 !

Letero el SriLanko

Karaj gesamideanoj!

Mi estas prezidanto de Junulara Esperanto Klubo de Shanthi, Diyatalawa, SriLanko.

Junulara Esperantista Klubo de Shantee (JEKS) estas la loka klubo por esperantistoj en la Diyatalawa regiono. Ĝi estis fondita en 2009. Celo de nia klubo estas efektiviĝi diversajn projektojn al la esperantista junularo de la regiono, plibonigi ilian sciojn, kompetentojn kaj lertojn. Societo por la Vivstilo Libera pri Drogaj kaj Alkoholo estas la plej nova projekto kiun ni efektiviĝis. Ni estas ĝis nun nur malgranda grupo, sed tre aktiva klubo. Tie estas ĉ. 288 aktivaj membroj en nia klubo. Kaj ni havis ankaŭ kvar Esperanto-parolantajn familiojn.

Mi sendas al vi adresojn de kelkaj membroj de nia klubo kiuj deziras korespondi kun membroj de via klubo. Ilia celo estas plibonigi sian scion de Esperanto.

Dankas vin amike,
Rupa Gunatilaka.

Korespondi deziras jenaj membroj de Junulara Espeanto Klubo de Shanthi (JEKS) per la reta adreso info.shanthee2011@gmail.com:

W. Malanee (18 jaroj) Universitata Studentino.

Premalatha R. (21 jaroj). Instruistino

Shanika Maduwanthee (17 jaroj). Studentino.

G. M. Ranjika Subashani (13 jaroj). Lia patro estis ĵurnalisto kaj forpasis en 2009. Nun vivas kun patrino, fratino kaj avino. Lernas ĉe la 6-a klaso ĉe Diyatalawa M. V.. Ankaŭ membro de “St. John Ambulance Association of Sri Lanka”.

Shehan Maduwantha (14 jaroj). Studento de 7a klaso.



9-A KONGRESO DE EEU - IRLANDO 2012

kiam?

16. - 20. 07. 2012

WWW.EUROPO.EU

informiĝu! aliĝu!

organizas

EŬROPA ESPERANTO-UNIO

urbo

GALIVO / GAILLIMH / GALWAY

lando

IRLANDO

temo

LINGVOLERNADO EN EU: LERNI PLI, KOSTI MALPLI

